komunikoj

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

JARO 36-a | APRILO - MAJO - JUNIO | N-ro 142 2011

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

# LORENZ, UKE kaj BKE




Alproksimiĝas la plej grava data de la Esperantista Movado, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Danio, kaj, kiel ĉiujare okazas, Eldonejo Lorenz partoprenos.

Inter la aktivaĵoj de Lorenz estas la partopreno en la Movada Foiro, kie ni ekspozicias librojn, disdonas prospektojn pri Spiritismo kaj multe interbabilas pri nia Doktrino kun diversaj fratoj el aliaj landoj kaj aliaj religioj.

Alia grava momento estas la prelego pri Spiritismo faronta de samideano José Passini pri la ĉeftemo "Spiritismo kaj Renkarniĝo", kaj la subtemo: "Jesuo, Edukanto de Animoj". Ankaŭ, en ĉi-tiu momento, ni profitas la agrablan etoson por lanĉi Almanakon Lorenz 2011.


Do, karaj, ni vin atendas en Danio!

Sed... antaŭ Danio, Eldonejo Lorenz vigle partoprenos la Brazilan Nacian Kongreson en San-Paŭlo, same kiel en Danio, ni prelegos, vendos librojn kaj.... la **granda novaĵo:** dum la kunsido de Lorenz, ni lanĉos *Almanakon Lorenz 2011* kaj tri el la verkistoj, Osvaldo Pires de Holanda, José RobertoTenório kaj José Mauro Progiante ĉeestos por ĝin aŭtografi.




Jen ĝi, kara legantoj, **ALMANAKO LORENZ 2011**! Kia bela trezoro! Renato Corsetti (Italio), Sun Minĝiao (Ĉinio), Johan Van Eenoo (Belgio), Bob Phelp (Aŭstralio), Lenka Angelová (Ĉehio), Roy McCoy (Usono/Nederlando), Ileana Schroder (Danio), Andreo Andrio (Francio) kaj aliaj gravaj brazilaj verkistoj. Krom tio, estas du gravaj intervjuoj kun Trevor Steele kaj Edgard Machado.

Se vi aĉetos la ĉi-jaran numeron, vi ricevos, senpage, Almanakon 2010 kaj alian belan surprizon! Petu tuj la vian!





Diris Jesuo: "Ne maltrankviliĝu via koro", instruante ke la trankvilo kaj la konfido al Dio devas esti la celo de ĉiu estulo kiu deziras trovi la feliĉon.

Neniam mankas motivoj por afliktoj maltrankviligantaj la koron kaj malordigantaj la vivon.

La homa ekzistado estas oportuno, por ke ni valorigu la eternajn bonojn kaj intiman lumigon.

Se vi metas viajn komprenojn en la Diajn manojn, kaj konfidas al Dio vian vivon, ĉio okazas normale, sed se io ĝena okazas, la sereneco prenas la regadon de la situacio, kaj agas kun laŭdinda ĝusteco.

Tiamaniere vi ne vin permesu maltrankviligi la koron, nek la menson, antaŭ la malsukcesintaj okazaĵoj.

*Joana de Ângelis*

El la libro "Vivo Feliĉa"
Mediumo: Divaldo P. Franco
Tradukis esperanten: Osvaldo Pires de Holanda

## ETAJ INFORMOJ PRI PLURAJ ENKARNIĜOJ DE TIU NOBLA SPIRITO

**JOANA DE ÂNGELIS** estas pseŭdonimo de la spirita aŭtorino de la verko "*Vivo Feliĉa*".

En la lasta reenkarniĝo ŝi vivis en la urbo Salvador (ŝtato Bahia, Brazilo), kie ŝi naskiĝis en la 11-a de decembro 1761.

Kiam ŝi estis 21-jara, ŝi eniris en la Monaĥinejon Lapa, kaj ŝi ricevis la nomon Joana Angélica de Jesus. Pro siaj meritoj ŝi fariĝis abatino en 1815. Dum la batalo por la sendependigo de Brazilo ŝi defendis la monaĥinejon, kaj estis mortigita en la 20-a de februaro 1822.

En la spirita mondo ŝi laboras por la progreso de la homaro, kaj jam diktis, pere de la mediumo Divaldo Pereira Franco, multajn librojn, kun belaj kaj utilaj mesaĝoj bazitaj sur la Evangelio de Nia Sinjoro Jesuo Kristo.

En 1651 ŝi renaskiĝis en San Miguel Neplante, en Meksikio, kun la nomo Juana de Asbaje y Ramírez de Santillana, kaj ŝi fariĝis monaĥino kun la nomo Sóror Juana Inês de la Cruz.

En la epoko de Sankta Francisko el Asizo ŝi vivis en Italio, kaj estis disĉiplino de Sankta Klara.

En la tempo de Jesuo ŝi estis Joana de Cusa, en Romo. En la jaro 68 p.K. ŝi estis mortigita kune kun la filo kaj pli ol kvincent kristanoj, kiuj estis bruligitaj, kaj la flamoj eĉ lumigis la urbon. Ŝi vivis en Kafarnaŭm, kaj akompanis Jesuon. Sed ŝi estis la edzino de intendanto de Antipas. Ŝia edzo ne havis la saman intereson por spirita progresado, kaj ne akceptis la doktrinon de la Majstro. Tial Jesuo konsilis al ŝi, ke ŝi sekvu Lin de malproksime pro la sinteno de la edzo.

Kara amiko, se vi ankorau' ne aliĝis al nia Eldonejo, ne perdu tempon!! Se tion vi faros, vi ricevos, en la konforto de via hejmo, du librojn kaj **Almanakon Lorenz**. Do, estimata amiko, helpu nin diskonigi belaĵojn tra la tuta mondo! Petu tuj informojn pri via aliĝo.

editora_lorenz@uol.com.br



# KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

Al s-ro K. H. en Aleksandrovsk

La elparolado de la duoblaj vokaloj aŭ, eŭ k. c. kiel Vi ĝin trovas en la gramatiko de la klubo Nurnberga, ne estas ia enkondukita novaĵo, sed ĝi estas simple ne bona klarigo de la regulo. En la sono aŭ la a kaj la ŭ devas esti aŭdata klare ĉiu aparte, sed ili faras unu silabon, ĉar efektive la litero ŭ ne estas vokalo. Tiel ekzemple la vorto "laŭdi" devas esti elparolata laŭ-di. Tiu sama ne bona esprimo de la regulo sin trovas bedaŭrinde ankaŭ en la gramatika parto de la Nº 2 de la "Esperantisto".

*La Red.*

Al Sinjoro K-F en D.

Anstataŭ "ĉio tio ĉi Vi povas tre bone diri "ĉio ĉi", ĉar la vorto "ĉ" jam per si mem signifas proksiman montron.

*L.Z-f.*

Al Majnov, 15.XI.1889

Estimata amiko!

La 10 gramatikojn por Rusoj mi sendas al vi hodiaŭ. La "Kolekto" kaj "Adresaro" ĝis nun ne estas ankoraŭ pretaj.

Al grafo Tolstoj vi povas sendi je mia kalkulo la mezan vortaron germanan kaj plenan rusan.

En mia lasta letero mi skribis pri la Nº 2 de la "Esperantisto", sed nun mi vin sciigas, ke la ekzempleroj jam estas al mi redonitaj kaj dissenditaj al la abonantoj.

*L.Z.*

Al Majnov, 21.XI.1889

Estimata amiko!

La "Esperantisto" estas permesita. Nun mi intencas jam loĝi konstante en Ĥerson, kaj ĉiujn leterojn vi povas adresi tien ĉi; sed ankaŭ la leterojn kiuj estas adresitaj en Varsovion, mi ricevas akurate tie ĉi (kvankam iom pli malfrue), ĉar oni transsendas ilin al mi.

La 10 ekzemplerojn de la lernolibro mi jam sendis al vi, mi ankaŭ skribis al vi pri la "Kolekto" kaj "Adresaro". Mia librotenejo estos nun en Ĥerson; sed ankaŭ en Varsovio mi lasis certan nombron da verkoj, kaj tiel ankaŭ el Varsovio oni povas elskribadi.

*L.Z.Z*


LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**

RUA FRANCISCO VALE, 57, ENGENHEIRO LEAL
RIO DE JANEIRO CEP 21370-171

Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>

# LINS DE VASCONCELOS EMINENTA SPIRITISTO KAJ DUMVIVA MEMBRO DE UEA



*Eurípedes Barbosa*

**ARTHUR LINS DE VASCONCELLOS** LOPES naskiĝis la 27-an de marto 1891, en Teixeira (Tejŝejra), Paraíbo, Brazilo, kaj elkarniĝis en la 21-a de marto 1952, en San-Paŭlo, sed lia korpo estis entombigita en Kuritibo, urbo kiun li multe ŝatis.

Li fariĝis serĝento en Brazila Armeo. Samtempe li studis en Supera Agronomia Lernejo, kie li diplomiĝis kiel agronomo.

Lins konis Spiritismon en 1912 kaj tri jaroj post, kiel sekretario de Spiritisma Federacio de Paranao, partoprenis en la inaŭguro de "Albergue Noturno", de tiu organizaĵo. Ankaŭ ĉeestis la eventon S-ro Carlos Cavalcante de Albuquerque, guberniestro de Paranao.

En 1930, Lins ricevis la titolon de honora prezidanto de Spiritisma Federacio de Paranao, pro la fruktodonaj servoj favore al tiu institucio. En la sama jaro, li translokiĝis al Rio de Ĵanejro.

Pro sia laborkapablo kaj komerca inklino, li fariĝis milionulo, sed Lins ne sklaviĝis al riĉaĵo. Li multe monhelpis plurajn spiritismajn instituciojn, ekzemple, la Sanatorion Bom Retiro, en Kuritibo.

Lins Vasconcellos aktive partoprenis batalon por la laikeco de ŝtato, inkluzive estis prezidanto de Nacia Koalicio por la Laika Ŝtato.

En 1948, Lins kunlaboris por la realigo de la Unua Spiritisma Junulara Kongreso de Brazilo. Kiel honora prezidanto de tiu kongreso, li faris entuziasmigan prelegon al la gejunuloj, kiuj ĉeestis tiun eventon.

Pro la Ora Pakto, estis organizita en Rio de Ĵanejro la Karavano de la Frateco, kun partopreno de gravaj spiritistoj, inter ili, Lins de Vasconcellos. La karavano vizitadis plurajn urbojn de la norda kaj nordorienta regionoj de Brazilo, por unuigi la brazilan spiritisman movadon.

Lins reprezentis Spiritisman Federacion de Paranao ĉe Nacia Federacia Konsilantaro kaj estis sekretario kaj honora prezidanto de Societo de Medicino kaj Spiritismo.

Lia edzino nomiĝis Hercília César de Vasconcellos Lopes kaj estis lia tre amata kunulino dum longa tempo. Ŝi multe helpis la edzon por la sukceso de lia kariero.

Sendube Lins de Vasconcellos estis eminenta laboranto en la spiritisma rondo. Pro tio, la famkonata mediumo Francisco Cândido Xavier diris:

**"Lins de Vasconcellos estis firma kolono de nia Doktrino en nia lando, kaj sindona kolego en nia unuiga movado".**

Ney Lobo verkis tre interesan biografion de Lins, en portugala lingvo, eldonita de Spiritisma Federacio de Paranao, en 1997. Laŭ la aŭtoro, Lins estis la diplomato de la unuiĝo kaj la paladino de la laika ŝtato.

La diplomato de la unuiĝo ankaŭ fariĝis membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), en 1951. Kiam li elkarniĝis la revuo Brazila Esperantisto (majo-junio 1952) publikigis la jenan nekrologon:

**"En São Paulo forpasis je 21 marto 1952 nia samideano Arthur Lins de Vasconcelos Lopes, dumviva membro de UEA. Elstara figuro de la sociala, industria kaj komerca medioj, li dediĉis ankaŭ grandan parton de sia vivo al spiritistaj aferoj, kiuj multon ŝuldas al li. Eks-prezidanto de la Federação Espírita de ŝtato Paraná, li estis vic-prezidanto de la Liga Espírita do Distrito Federal, kaj direktoro de la gazeto Mundo Espírita."**



Frato! La suno brilas denove. Post multaj tagoj kun longedaŭra kaj abunda pluvado, revenas la brila suno. Trankviligu vian koron! Post longa kaj forta suferado revenos sano kaj feliĉo. Malsano kaj malfeliĉo ne daŭros porĉiame. Denove revenos la feliĉaj tagoj kaj sano kaj ĝojo. La surtera vivo estas tia. Sed, se vi rigardos ĉiam la ĉielon, vi rimarkos, ke ĉio al ni okazanta venas por ĝojo kaj feliĉo. Malbono ververe ne ekzistas, ĉar ĉio estas bona. La pluvaj tagoj estas bonaj, same kiel la sunaj tagoj. Malfeliĉaj tagoj estas tiel bonaj, kiel feliĉaj tagoj. Benu ĉiun tagon, kaj danku al Dio la ĉiutagajn okzaĵojn, kaj vi estos ĉiam feliĉaj. Jesuo benu nin ĉiujn!

*Esperantisto*

Mediumo: Délio Pereira de Souza – 27.01.92

## PAC-HORO 25 JARIĜIS!

La 16-an de majo, Grupo de Esperanto Pac-horo organizis belan eventon por memorfesti sian 25-an jariĝon. Pli ol 260 personoj ĉeestis la memorindan datrevenon. Sendube estis neforgeseblaj momentoj.

Se vi volas koni la Grupon kaj ricevi fotojn de la datreveno, skribu al: **pac.horo@yahoo.com.br**

Nome de Eldonejo Lorenz, ni gratulas la Grupon!

Antaŭen!



